

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Versijnt maandelijks Vertegenwoordiger in Nederland:  
Een en twintigste jaarg. L E E N  
Nummer 4 (237) sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
APRIL 1954 postrek. 34563 van P. M. Mabesoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND  
POSTBUS 100, MECHELEN  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.  
Raapstr. 74, Gent

LIDGELDEN:  
\* Leden: 100 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:  
België: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## BEZINT EER GIJ BEGINT!

In December 1953 deed de heer H. H. Koch, fractievoorzitter van de P. v. d. A. in de gemeenteraad te ARNHEM het voorstel om deze stad tweetalig te maken, door naast het Nederlands het Engels te gebruiken, aangezien de groeiende Europese eenheid een gemeenschappelijke voertaal noodzakelijk maakt, terwijl om sociale redenen zoveel mogelijk mensen door de kennis van een tweede taal in de gelegenheid moeten worden gesteld deel te nemen aan het internationale leven.

Het Vrije Volk, te Arnhem, van Woensdag 25 Febr. '54, waaraan we het bovenstaande ontleenden, gaat dan verder met te vermelden, dat het Gemeentebestuur een groot aantal burgers, vertegenwoordigers van het Onderwijs, van toeristische organisaties, van Volksuniversiteit en Instituut voor Arbeidersontwikkeling, van Middenstandsorganisaties e.d. heeft uitgenodigd om hun oordeel te geven over de suggestie van de heer Koch.

In het verslag van deze bijeenkomst, die Dinsdag 24 Febr. werd gehouden, wordt gezegd, dat over 't algemeen het voorstel van de heer Koch wel weerklank vond. De heer Van Haaren uit Amsterdam hield als vertegenwoordiger van de Esperantistenbeweging een pleidooi voor Esperanto, terwijl de heer C. Hagen, voorzitter van het Instituut voor Arbeidsontwikkeling zei: „Met mijn hart kies ik het Esperanto als tweede taal, maar om praktische redenen geef ik de voorkeur aan Engels”.

\*\*\*

We zijn de heer Koch en het Gemeentebestuur dankbaar, dat hier duidelijk is gezegd, dat de Europese eenheid niet tot stand kan komen zonder een gemeenschappelijke taal, want dat is volkomen juist en hoe meer mensen dat gaan inzien hoe beter het is.

De grote vraag is echter welke taal men als gemeenschappelijke taal moet kiezen. In Arnhem meent men dat het Engels moet zijn. Enige tijd geleden werd van Franse zijde ook 'n tweetaligheid gelanceerd. Men stelde n.l. voor, dat de Fransen, de Engelsen en de Engelsen de Franse taal zouden gaan leren en de overige Europese landen en Frans en Engels. Dit zou voor die overige landen dus neerkomen op 'n drietaligheid want de moedertaal van deze landen hoort er toch ook nog bij. Dit voorstel, dat een grote bevoorrechtiging van het Frans en Engels inhield, is op 'n groot fiasco uitgelopen en we zijn overtuigd, dat het met het voorstel van de heer Koch niet anders zal gaan.

De enige mogelijkheid om tot, een gemeenschappelijke taal voor de Europese Gemeenschap te komen, is uit te gaan van het democratische principe, dat de deelnemende landen gelijkberechtigd zijn, en dan kan er geen sprake van zijn dat een nationale taal als zodanig wordt aangenomen.

We hadden dan ook van een fractievoorzitter van de P. v. d. A. allerminst een dergelijk voorstel verwacht, want zou het ooit werkelijkheid worden, dan moet de voorsteller toch wel de mening toegedaan zijn, dat ook de andere landen van de Europese Gemeenschap genegen zullen zijn het Engels als algemene voertaal te accepteren, waardoor dan aan het Engels een allesoverheersende positie zou worden toegekend en van gelijkberechtigtheid niets terecht zou komen.

We zijn dan ook van mening dat het voorstel te ondoordacht is gedaan, zowel wat de principiële zijde betreft, als wel de praktische uitvoerbaarheid ervan.

Volgens bovengenoemd verslag is het niet de bedoeling het Engels op de Lagere School in te voeren maar zou het onderwijs in cursusverband buiten de schooltijden moeten ge-

schieden. Hoe stelt men zich voor de kinderen en/of volwassenen naar deze cursussen te krijgen en hoe zullen deze gefinancierd worden? En wat denkt men met deze cursussen eigenlijk te bereiken? Op de Middelbare Scholen brengt men het niet verder dan enige passieve taalkennis; aan de actieve beheersing van een moderne taal, d.w.z. het vloeiend spreken en schrijven van een vreemde taal komt men niet toe. Meent men dat met deze cursussen wel te kunnen bereiken? Hoe lang moet zo'n cursus dan wel duren? Ziedaar enige praktische vragen die o.l. dringend beantwoording eisen alvorens met de verwerkelijking van het voorstel een aanvang gemaakt zou kunnen worden.

\*\*\*

Het is jammer dat de heer Van Haaren niet meer gehoor heeft gevonden en dat nog wel in een stad waar zich een Zamenhofstraat, naar de schepper van Esperanto, bevindt en het „Esperanto-Domo" zich voor de oorlog in veel bezoek mocht verheugen. Ook wij zijn ervan overtuigd dat slechts een neutrale taal als Esperanto voor de gemeenschappelijke taal in aanmerking kan komen omdat dan alle landen op gelijke voet staan en niemand zich de mindere tegenover de andere zou behoeven te voelen. Het toepassen van de internationale taal Esperanto is een daad van internationale wellevendheid zijn.

Als de heer Koch zich behoorlijk georiënteerd had, had hij kunnen weten, dat

deze zaak reeds door de UNESCO in behandeling is genomen en dat in de Algemene Vergadering die dit jaar te Montevideo zal plaats vinden hierover een rapport zal worden uitgebracht.

Dat Esperanto zeer geschikt is om als internationale taal te dienen, daarvan kan het Gemeentebestuur en ook de heer Koch zich gemakkelijk overtuigen indien zij de moeite willen nemen een bezoek te brengen aan het Esperanto-Congres dat dit jaar van 31 Juli — 7 Aug. in Haarlem gehouden wordt en waarvoor zich thans reeds bijna twee duizend bezoekers uit ongeveer 30 landen hebben aangemeld, terwijl Minister-President Dr. W. Drees het Ere-Beschermheerschap heeft aanvaard. Beroepsartisten zullen een toneelstuk in Esperanto opvoeren en geleerden van naam zullen lezingen houden over verschillende onderwerpen.

Tenslotte willen we nog vermelden, dat binnenkort een boek van Dr. Paul Neergaard, Afdelingschef van de Staats-Plantenpathologische Dienst te Kopenhagen, in Esperanto zal verschijnen getiteld: „Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj" (Aanvallen op tuinplanten) ± 230 pag. met 9 gekleurde en 80 ongekleurde afbeeldingen. Terwijl onlangs verscheen het werk „Aktualaj Problemoj en la nuntempa internacia vivo" (Actuele Problemen in het hedendaagse Internationale Leven) van Prof. Dr. Ivo Lapenna, dat in juridische kringen veel opgang heeft gemaakt.

Gezien dergelijke feiten menen we niets te veel te zeggen indien we aan de Vroede Vaders en anderen te Arnhem het „Bezint eer Gij begint" toeroepen.

F. Weekc.

## La Tradukmaŝino

En multaj tagjurnaloj, antaŭ kelka tempo jam, aperis interesa artikolo, kies traduko sekvas:

New-York, 8an de januaro (A.F.P.)

Sensacia utiligo de la elektronikaj kalkulmaŝinoj estis prezentata en New-York. Kalkulmaŝino „I.B.M." sukcesis traduki en taŭgan anglan lingvon proksimume sesdek ruslingvaj liniojn. La rusa lingvo estis elektata pro sia malfacileco kompare kun okcidenta lingvo. La ruslingvaj frazoj markitaj sur laboritaj kartoj reeliris el la maŝino post ses ĝis sep sekundoj, tradukitaj anglalingven sur rulo simila al tiu de skribmaŝino.

La teknikistoj, kiuj plenumis la elmontrandon, akcentis ke, por ke la traduko estu tute fidela, estis necese devigi la maŝinon fari la sintaksajn akordigojn kaj havi konsideron pri la gramatikaj nuancoj. Tio estis realigata dank' al la registrado fare de la „elektronika memoro" de la maŝino, de speco de „vortaro" de faktoroj (elektraj impulsoj), kiuj devigas la maŝinon „elekti" inter la diversaj signifoj de vortoj tiun kiu ekzakte konvenas. Necesas plie ke la elektita vorto okupu en la frazo la taŭgan lokon.

Ekzemple, la rekta komplemento kiu, en la rusa lingvo ĝenerale troviĝas antaŭ la verbo, troviĝas male en angla lingvo post la verbo kaj la maŝino devas efektiviĝi la necesan inversion.

La tiel nomata „vortaro", kiu servas por la elmontrado, entenis nur proksimume du cent kvindek vortojn kaj nur simplaj frazoj estis donataj por traduki al la maŝino. La teknikistoj rimarkigis ke neniu tradukmaŝino estas nun preta por esti liverata al la merkato kaj ke temis nur pri provado ke ordinara elektronika kalkulmaŝino estas kapabla decifri kodvortaron. Restas nun la tasko finpretigi kompletajn vortarojn por ĉiu el la lingvoj tradukotaj.

La porparolanto de la firmo eĉ diris ke la realigo de parolanta tradukmaŝino estas nuntempe teorie ebla kaj konkludis: „Estas verŝajne ke la samtempa traduko, tia kia ĝi nuntempe ekzistas en la Unuiĝintaj Nacioj, okazos post dek aŭ dekkvin jaroj nur per maŝino.

Ĝis tie la traduko, espereble sufiĉe fidela, kvankam ne maŝina.

La legado de tiu artikolo igas iom revema. Ĉu estas kredeble ke la streĉa traduklaboro, kiu postulas ne nur la helpon de fidindaj vortaroj, sed jarojn da studado ĝis plena posedo de la du koncernaj lingvoj, ĉu estas kredeble ke tiu laboro estos iam farata de maŝino, en kiu oni enmetos ekzemple rusan tekston unufanke por tuj ricevi je la alia flanko tute korektan anglan tekston, kiel buĉisto kiu metas vian donon en sian muelilon kaj ricevas kolbasojn je la alia ekstremajo? Se vere post dek aŭ dekkvin jaroj tiaj maŝinoj estos ĉiuloke haveblaj kaj uzeblaj, ĉu utilas ankoraŭ propagandi nian internacian lingvon?

La moderna tekniko faris jam tiajn miraklojn ke ni eble ne rajtas dubi pri tiu nova mirindaĵo. La telegramo kiu anoncas tiun sensacian novaĵon ne estas datumita de la 1-a de aprilo kaj tamen ĉu ni ne devas timi iun usonan blufadon?

Kiu vivos, vidos. Sed intertempe ni povas nur konstati ke la homaro plirapidigas siajn paŝojn sur vojon kiu saĝnas al ni erara. Ĝi volas ĉion solvi per la plej materia tekniko kaj forgesas la pli subtilajn sed verŝajne pli sekurajn vojojn de la spirito. Nia solvo: internacia helplingvo por ĉiuj homoj estas ege pli simpla, pli malmultekosta kaj certe pli efika.

(Legu plu p. 2, kol. 2)



## 39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Postfako 140, Haarlem, Nederlando.

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

Nro 6

OFICIALA KOMUNIKO

Marton 1954

**Pagoj:** Al Rotterdamsche Bank, Haarlem, al Postgirkonto 604997 kaj al Perantoj en diversaj landoj. L.K.K. akceptas pagilojn ŝanĝeblajn en banko sed absolute ne povas akcepti varojn aŭ librojn kiel pagon. Sendu Aligilojn, Mendilojn kaj pagojn al la sama instanco: ĉu L.K.K., ĉu peranto.  
**Grave:** Por eksterlandaj ĉekoj la banko postulas makleron de guld. 0.50. Preskaŭ neniu ĝis nun aldionis tiun sumon. (= 2 rpk.).

**Mendoj:** Kvankam la Dua Bulteno kaj Instrukcioj pri mendoj estas en kiel eble plej simpla lingvo multaj faras erarojn. Saĝnas ke oni ne legas la instrukciojn Erarajn kaj fuŝitajn Mendilojn la L.K.K. resendas. Ne antaŭpago loĝadon kaj ekskursojn.

**Programo:** Iuj ne mendas la matenajn ekskursojn ĉar ili ne scias la programon. Ankaŭ L.K.K. ne scias ĉar ĝi estas difinita nur je Pasko. Tamen preskaŭ certe oni povas kalkuli pri la jenaj: lundon matene: kunsido de U.E.A.; lundon ptm.: Laborkunsido; mardon matene: Laborkunsido; mardon ptm.: fakaj kunvenoj; merkredon matene: Belartaj Konkursoj; merkredon ptm.: Oratora Konkurso; vendredon matene: Kunveno de U.E.A.; vendredon ptm.: fakaj kunvenoj, Akademio.

**Junulara Programo:** Evidentas, ke granda nombro da ĝejunuloj inter la aĝoj 6 kaj 16 jaroj partoprenos la kongreson. La L.K.K. tial okupigas pri diversaj programeroj speciale por tiuj junuloj. Tio verŝajne enhavas vizitojn, ekskursojn, distraĵojn. Detaloj sekvos.

**Adresoj:** Kelkaj poŝtajtoj revenis kun indiko „Nekonata". Bonvolu tuj sciigi al L.K.K. en okazo de adresa ŝanĝo.

**Esperanta Seminario:** En la 3 tagoj antaŭ la U.K. okazos en Haarlem Seminario por Cseh-instruistoj. Informoj haveblaj ĉe: Internacia Esperanto-Inst., Riouwstraat 172, Den Haag.

**Bultenoj:** Ne aperos nova bulteno. La venonta dokumento de L.K.K. estos la Kongresa Libro (nun en preparo). Espereble ĝi atingos ĉiun aliginton frue en junio.

**Limdato/Limcifero:** L.K.K. denove atentigas pri la limigo de partopreno en la kongreso. La maksimuma partopreno en la kongreso estas 2000 kaj kiam tiu cifero estos atingita L.K.K. rezervas al si la rajton rifuzi pliajn aligojn. Cetero neniu povos aliĝi post 30-a de junio 1954.

**Statistiko:** Aŭstralio 1, Aŭstrio 12, Belgujo 50, Brazilio 3, Britujo 231, Danujo 53, Finnlando 31, Francujo 188, Germanujo 188, Hispanujo 16, Indonezio 1, Italujo 50, Japanujo 1, Jugoslavio 68, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 471, Norvegujo 70, Novzelando 11, Portugalujo 7, Svedujo 143, Svislando 24, Turkujo 2, Usono 7. Sumo el 25 landoj 1635 pasintjare 745. (Lasthora sciigo: 2000 atingitaj! Aliĝoj ne plu akceptataj! — Red.).

Mason Stuttard,  
Konstanta Kongresa Sekretario

**KURIOZA BURLESKA PAMFLETO**

„LA BAPTO DE CARO VLADIMIR” de Karel Havlíček Borovský: Legendo el la rusa historio. El la ĉeĥa esperantigita kaj komentita de Tomas Pumpř kun portreto de la aŭtoro kaj kun 53 desegnaĵoj de Josef Lada; kovrilo de John Hartley — STAFETO, Belliteratura eldonserio 2 — 1953 — 144 p. — Prezo: 1.50 Us. dol.

La fundamenta tono de la ĉeĥa literaturo restis ĝis en la 19a jarcento nacia kaj sociala en demokratia senco. Karel Havlíček (1821—1856) estis unu el la pioniroj de realisme pensanta generacio kaj iĝis verkisto de klasika signifo en periodo, kiam la liberalaj ideoj pli kaj pli enpenetris la habsburgan regnon kie ili estis severe kontraŭataj de despotisma reĝimo, apogata de trodependa eklezia hierarĥio.

Krom la karakteriza fakto, ke Havlíček estis la unua ĉeĥa tradukinto el Voltaire, „La Bapto de Caro Vladimir” pensigas pri alia franco, nome Rabelais. (I.a. la cinik-burleskan „Marŝon de la Jezuitoj” ŝajne inspiris samsona fragmento en „Gargantua” — ĉap. XXXVIII). Sufiĉas por ekhavi ideon pri la spirito de la nune esperantigita verko en dek „Kantoj”, eksterlande preskaŭ nekonata malgraŭ tradukoj en le ukraina, rusa, germana, slovena, angla kaj pola.

La ĉeĥa raso ŝajnas ja iom parenca al la franca pro ĝia emo al logiko kaj racionalismo, nehavante tamen ties facilan skeptikismon kaj gajan ironion. La sana gajo, la humoro, iam skribis la ĉeĥa akademiano H. Julínek, estas planto kiu ne prosperas sub la klimato de Bohemujo. Tial la ĉeĥa humoro plejofte identas kun malamo malestimo, malespero. Kredeble la historia subpremado kaj suferado de la

ĉeĥa popolo metis tian stampon sur ĝian literaturon...

La vivo ankaŭ de l'tro frue mortinta Havlíček, ido de energiaj montanoj, arda patrioto, sagaca politikisto kaj brila ĵurnalisto, ĉiam sur la barikado, estis ege maldolĉa. Post religia krizo dum li estis seminariano, li sin manifestis kiel senlaca sed neniel objektiva kontraŭbatalanto de absolutismo kaj klerikalismo, kio estigis sur la literatura kampo ducenton da epigra-

moj i.k. la priktraktatan verkon, kiu entenante aktualerojn ĉiamajn, estas unu el le plej mordaj paskviloj ekzistantaj.

En detala aldono, la tradukinto, D-ro Pumpř, jam favore konata el „Literatura Mondo” kaj „Ĉeĥoslovaka Antologio” zorgas pri ekzemplaj biografio, klarigo pri la estiĝo de la poemo kaj komento pri la unuopaj kantoj. Temas pri Perun, la Jupitero de la slava mitologio, kiu rifuzinte tondri je or-

**LA LIBRO-SERVOJ POVAS LIVERI AL VI:**

	Gld.	Fr.
La Normandaj Rakontoj (Maupassant) <i>tolbind. gld.</i>	12,—	160,—
Gösta Berling (Lagerlof) <i>id.</i>	11,15	80,—
<i>id.</i>	<i>broŝ.</i>	66,—
Infanoj en Torento (Engholm) 2 volumoj <i>kune</i>	4,—	55,—
Pasko (Strindberg)	1,20	
La konscienco riproĉas (Strindberg)	0,75	7,—
Ekspedicio Kontiki (Heyerdahl) <i>tolbind.</i>	13,—	175,—
Rapsodio, II-a, III-a, IV-a (Szilagyi) <i>po</i>	1,60	20,—
Vivo vokas (Engholm) <i>broŝ.</i>	4,90	
<i>id.</i>	<i>bind.</i>	65,—
Barbro kaj Eriko (letera romaneto)	0,60	7,—
Mi serĉis oron kaj oleon (Flood) <i>broŝ.</i>	4,50	55,—
<i>id.</i>	<i>bind.</i>	65,—
Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj (ilustrita) <i>tolb.</i>	7,90	105,—
Fabiola (Wiseman) <i>broŝ.</i>	4,50	
<i>id.</i>	<i>bind.</i>	80,—
La homaj rasoj de la mondo (Nordenstrem)	3,40	36,—
Fremdvortoj en Esperanto (Neergaard)	1,10	13,—
Gebonden stijl (Faulhaber)	0,85	5,—
La Esperanto movado (Stöp Bowitz-Isbrucker)	2,—	30,—
Vortoj kaj Esprimoj (Zondervan)	1,15	15,50
Esperanto in 20 lessen (Bakker)	3,—	
Esperanto leerboek Zondervan-Manders	2,50	34,—
Post la kurso (de Bruin-Faulhaber)	2,—	30,—
Esp. leerboekje Lagere School I en II (Appel) <i>po</i>	1,50	20,—

**MENDU ĈE**

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam  
Flandra Esp. Instituto, Blankenbergse steenweg 72, Brugge

**Plursenceco kaj Metaforeco en Esperanto**

Unu el la plej rimarkindaj lingvo-fenomenoj kiujn la akurata leganto senĉese povas observi en la literaturo, estas la plursenceco de vortoj kaj frazoj. En ĉiuj naturaj lingvoj, ĉu historiaj ĉu modernaj, en parolo aŭ skribo, la plursenceco okupas neatendite gravan lokon. Kiu iam legis verkon de eminenta aŭtoro, nacilingvan aŭ esperantan, estis tuj kaj nerezisteble frapita de ĉiam denove mira, intensa pensludo, vestita en ĉiaj lingvo-figuroj, inter kiuj plejofte dominas klare la plursenceco.

Generale plursenceco estas propreco de ĉiuj lingvoj; sed en prilingvaj konsideroj de diversaj esperanto-gazetoj oni jam plurfoje — kaj prave — atentigis la fakton, ke en planlingvo la problemoj ĉirkaŭ la plursenceco prezentiĝas alie ol en naturaj aŭ naciaj lingvoj. En planlingvo ekz. „idiotismoj” estas nepre malrekomendindaj, dum en naciaj lingvoj oni same nepre povus pravigi la uzon de „idiotismoj”. Konstatendas, ke en naciaj lingvoj pri jes- aŭ nerekomendindeco de iu esprimo decidis unufoje la fakte ekzistanta (do ofte plene arbitra!) lingva tradicio kaj nur duafoje la popola logiko. En planlingvo tamen la logiko estas la plej decida faktoro, dum la fakta internacia konateco, de iu vort- aŭ esprimsenco povas maksimume liveri aldonan, dualokan kriterion.

Parolante pri logiko en la planlingvo, oni povas meti la demandon: kia logiko kapablas plej klare kaj kontentige solvi planlingvajn problemojn? La respondo donis la tuta historio de la Esperanto-movado ĝis nun! Ĝi nekontesteble pruvas, ke nur scienca, ne popola logiko realigis plej bonan rezulton. Pozitive oni povas konkluditi el la fakto, ke la decidoj de la Akademio montras sciencajn difinojn kaj priskribojn, dum la iamaj mokoĵ kaj miskredititoj ĉirkaŭ la „logiko” interniaj gramatikistoj firme konjektigas, ke en multaj prilingvaj artikoloj la popola logiko anstataŭis la sciencan, kaj favorigis la skeptikulojn.

Per plursenceco en vasta signifo oni ofte komprenigas ankaŭ certajn „najbarajn” nociojn, kiaj ekz. metaforeco. Tamen inter plursenceco en strikta signifo kaj metaforeco estas grava dife-

renco. Metaforeco koncernas nur eksteran, akcesoran (arbitran) similecon inter du aferoj aŭ ecoj. La astronomo ekz. parolante pri stelgrupo „La granda Urso”, tute ne opinias per tiu esprimo konstati esencan internan similecon inter diversaj vort- aŭ esprimsentelgrupo. Kontraste al metaforeco plursenceco en strikta signifo tamen rilatas ĉiam esencan, internan similecon inter diversaj vort- aŭ esprimsencoj. Konstatante ekz., ke la vizaĝo de mia amiko montras „sanan” koloron, kaj ke la kuracisto donis al sia paciento „san(ig)an” medicinon, oni ja komprenigas, ke la saneco de la vizaĝkoloro estas signo de saneco, kaj ke la medicino de nia kuracisto estas ilo por saneco. Tamen la vera, unua kaj plena senco de „sana” koncernas la bonstatan organismon de vivanta estaĵo, kaj la aliaj t.n. ĉefsencoj (ekz. signo kaj ilo de saneco) partcipas la ĉefsencan de „bonstata organismo” k.t.p. Kaj ĉi tie klare temas pri esenca, ne pri akcesora, aŭ arbitra simileco, kian oni renkontas ĉe metaforaj esprimoj.

Ĉar al Esperanto kiel internacie komprenenda planlingvo ne povas manki la logiko, kaj la strikta plursenceco, grandparte rezultiĝas ĝuste el tiu sama logiko, estas kompreneble, ke tiu ĉi plursenceco ne kaŭzis tiom da lingvaj diskutoj, kiom la metaforeco, kiu ĉefe dependas de tradiciaj, rutinaj faktoroj. Ĝuste sur la tereno de tiu ĉi metaforeco atendas la estontan esperantologion ankoraŭ grava sed interesa tasko!

F. Winkel.

**LA TRADUKMAŝINO**

(Komenco p. 1, kol. 4).

Se iam vere ekzistos tradukmaŝinoj, ili estos ege komplikaj, multekostaj kaj nur uzeblaj por potencaj organizaĵoj kaj la Unuigintaj Nacioj aŭ registaroj de riĉaj ŝtatoj. La simpla homo neniam povos vojaĝi tra fremda lando kun tradukmaŝino sur sia dorso kaj por ke li havu kun siaj homfratoj el ĉiuj terzonoj tiun intiman kontakton, kiun donas nur komuna lingvo, li ĉiam povos plej efike uzi tiun facilan Esperanton, kiun donacis al ni la spirita geniulo Dro Zamenhof.

Ŝa Pu Pej.

dono de la rusa caro Vladimiro. heroo de multaj popolaj eposoj, estas ekzekutita post kondamno fare de milita tribunalo:

... La soldatoj - akraj knaboj - en juĝa-arto fortas: ĉiujn siajn paragrafojn en kuglujo portas.

La Civilan Tribunalon ili mokas trafe: ili juĝas laŭokule, ne laŭparagrafe.

La Milita Tribunalon ne bezonis dikton: el nenio - kiel dikto - kreis la verdikton.

Poste la caro, persvadite de la pastroj, ke nova dio nepre estas bezonata, okazigas konkurson por la vakanta „posteno” kaj ĉiuj religiaj kandidato laŭdas siajn meritojn. Jen, tre koncize, la temo de la „nefinita”) verko, pruntita de antikva kroniko, laŭcele aliformigita de la aŭtoro. Tiu ĉi, metante la oreton ĉe l'popola buŝo, funde studis ĝian poezion kaj saĝon kaj, rekreante ilin, atingis simoleon de kruda popolforto. Oni ja laŭdas la brilan vervon de la ĉeĥaj versoj kun preskaŭ popola kadenco, kiuj - trempitaj en folkloro sprito foje triviale kun satira kromgusto - familiare disvolviĝas al groteska karikaturo.

Ni volonte kredas, ke necesis al la tradukinto „pesi tre atente la vortturon kaj zorge elekti la esprimojn por respeguli la familiaran etoson kaj la frapan forton de la poemo.” Trapasinte la logiko-kribilon de nia internacia (legu: eksternacia) lingvo la popolaj esprimoj ordinare multe perdas de sia suko kaj spico. Kompense ĉi-kaze la komika genro permesis ankaŭ ĉerpi el la vulgara provizo de la lingvo kaj nerica rimaro (Ekz. „leki/Feki; „Furzo-perdo/merdo”). La tradukinto sendube sukcesis sentigi la „aromon” de la originalo, eĉ pli ol necese (kial?) malfaciligante la taskon per la apliko de internaj rimoj:

... „Mi matene devas pene rosi kampan valon, hejti sunon, kaj la lunon fermi en la stalon”.  
kio, en alia traduko tekstas:  
... „Sed ve! Tuj matene devas dio kampon rosi, en la suno fajre hejti kaj la lunon ŝlosi.

La kunmetaĵoj pro rimomanko kaj aliaj estas senartifikaj kaj rimoj kun diferenca gramatika formo negliĝe bonifikas. Kio neeviteble perdiĝis je „couleur locale” estas riĉe kompensata per treege amuzaj bildoj, de la ĉeĥa nacia artisto, majstro Jozef Lada. Mallonge, la malfacile tasko estas lerte kaj glate farita de D-ro Pumpř

**LA STUDANTO**

Korekto: La vorto „spacomanko” tuj super ekzerco 13 B en n-ro 2 kompreneble estu „spacomanko”.

Jen la 5 frazoj kun la vorteto nur kaj la 5 konkludoj interkrampe de

**Ekzerco 13 B:**

1: Nur hieraŭ mi vidis Karlon en la parko (ne en aliaj tagoj). 2: Hieraŭ nur mi vidis Karlon en la parko (neniu alia vidis lin). 3: Hieraŭ mi nur vidis K. en la parko (mi ne parolis kun li). 4: Hieraŭ mi vidis nur K. en la parko (ne aliajn personojn). 5: Hieraŭ mi vidis K. nur en la parko (ne aliloke).

Ĉu vi sentas la grandan diferencon en la signifoj de la 5 diversaj frazoj? Do tre atentu pri la vortordo tiurilate!

**NOVAJ EKZERCOJ**

**Ekzerco 15 A:**

Kie estas streketo, tien metu la vorton kiam, tiam aŭ se:

**LA JUBILEA FESTO**

1: — s-ro Festemulo renkontis sian amikon surstrate, — li demandis tiun:  
2: „— okazos via jubilea festo?”  
3: „En majo, — mi — ankoraŭ vivos.”  
4: „— vi tiel parolas, mi preskaŭ konkludas, ke vi timas ne plu vivi —.”  
5: „— oni estas en vigla trafiko, oni ne estas certa pri sia vivo.”  
6: „Tia oni estas nenie kaj neniam, sed — vi vivos —, ĉu vi festos?”  
7: „— mi estos decidinta pri tio, mi sendos invitilon al vi.”  
8: „Mi — honoros vin,” diris s-ro F. —

9: — s-ro F. en junio ankoraŭ ne estis ricevinta invitilon, li telefonis al sia amiko:

10: „— okazis via jubilea festo? Mi ricevis nek invitilon, nek informon pri via morto.”

11: — la amiko respondis: „— mi estus havinta sufiĉe da mono, ĝi estus okazinta la 15-an de majo.”

**Ekzerco 14 B:**

Anstataŭ la vorteton nur en la 5 frazoj de ekzerco 13 B (vidu ĉi-supre) unue per ankaŭ kaj poste per eĉ kaj skribu vian konkludon inter krampoj malantaŭ ĉiun el la 10 frazoj laŭ ĉi-supra ekzemplo.

Ekzercojn korektotajn sendu antaŭ la 10-a de aprilo 1954 al flandraj Esperantistoj al V.E.B., „La Studento”, postbus 100, Mechelen; nederlandaj al S. S. de Jong Dzn., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.).

**Raporto pri la LEEN intersekcia traduk-konkurso**

Laŭ mia opinio la partopreno en la konkurso ne estis kontentiga, ĉar entute partoprenis nur 37 personoj, kiuj dividigis laŭ la jenaj sekcioj:

personoj	poentoj	premio
Almelo 4	88	2a
Amersfoort 10	76	4a
Amsterdam 9	87	3a
Deventer 8	91	1a
Heerenveen 6	64	5a

Bedaŭrinde estis ke du sekcioj anoncis sin tro malfrue.

La ENSPEZOJ sumigis 37 x F. 0,25 = F. 9,25  
Ĉar unu el la premiitoj de la antaŭa konkurso redonis sian premion, ni povis aldoni 6.—

La tuta sumo do estis F. 15,25

La ELSPEZOJ por papero kaj afrankoj estis .. 2,05

Saldo F. 13,20

Ĉi tiu sumo estas dividita jene:

Deventer	F. 4,—
Almelo	3,—
Amsterdam	2,75
Amersfoort	2,25
Heerenveen	1,20
entute	F. 13,20

Kore gratulante la premiitojn, mi volas fine esprimi mian sinceran dankon al S-ro S.S. de Jong Dzn pro la kontrolo de la taskoj.

La gvidanto F. Weeke

**Plaatselijk Nieuws**

Arnhem. La arnHEMA kunlaborkomitato organizis la 25-an de Febr. prelegesperon en kiu S-ro Makkink el Bennekom prelegis pri sia vojaĝo tra Usono, montrante belajn kolorbildojn. La vespero estis tre sukcesa kaj por aliaj sekcioj S-ro Makkink estas rekomendinda preleganto.

kio liveris, plenuzante ĉiujn eblojn, naturan, simplan, senperan, ridsonoran lingvajon. La klera leganto, se estus nur el literatura vidpunkto, vere interesiĝos pri ĉi tiu kurioza burleska pamfleto, kiu ajn estu lia propra opinio pri la akcesoraĵoj. TYNEVERUM.

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:  
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.  
 Penningm.: P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.  
 Boekendienst: S. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.  
 Schr. cursus voor gevorderden: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.  
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuistr. 29, Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.  
 Vic-œfd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

**VOLONTULOJN NI BEZONAS!**



Urbdomo

Dum la kongresaj tagoj en Haarlem ni bezonas multajn helpantojn, por kelkhora libervola deĵoro en la kongresejo. Al preskaŭ 100 kongresanoj ni sendis detalan cirkuleron kun klarigoj pri la farena laboro. Ĝis nun proks. 20 kongresanoj respondis kaj promesis kunlabori. La plimulto tamen ne respondis, eble opiniante, ke ilia helpo estos superflua. Sed precipe en la unuaj kongrestagoj ni bezonas multegajn helpantojn kaj krome plurajn rezervulojn, ĉar okazas, ke personoj, kiuj promesis kunlabori, lastmomente ne venas kaj devas esti anstataŭataj de aliaj kongresanoj.

Ni do esperas, ke tiuj kiuj ĝis nun ne respondis la suban parton de la cirkulero, ankoraŭ faros tion kaj ke ankaŭ tiuj kongresanoj, kiuj ne ricevis cirkuleron, skribos al la ĝen. sekr. de LEEN, ke ili estas pretaj kunlabori. Ju pli granda estos la nombro da helpantoj, des malpli longa estos ĉies deĵortempo.

Informcele ni mencias la diversajn taskojn por kies plenumo ni bezonas volontulojn:

Akcepto de la kongresanoj; disdono de dokumentoj.

Aranĝo de la kongresejo kaj salonoj por prelegoj, kunvenoj, ktp.

Deĵorado en la informejo por la teatraj vesperoj je 2/8, 3/8 kaj 4/8.

Diversspecaj administraj laboroj; disdono de poŝtoj, maŝinskribado, ktp.

Deĵorado en la librovendejo.

Kontrolo de kongreskartoj ĉe la enirejoj de la salonoj, ktp.

Deĵorado en la ekskursaj informejo.

Volonte ni kiel eble plej multe kalkulos kun viaj preferoj koncerne la deĵorhorojn kaj la karakteron de la farota laboro. Anoncante vin kiel helpanto, vi do bonvolu konigi viajn dezirojn kaj menci ĉu vi flue parolas Esp. kaj rapide povas tajpi.

Ĉiu helpanto sisteme ricevos informojn kaj instrukciojn pri sia tasko.  
 A. J. KALMA.

*Twoede congressuitzending: A.V.R.O. Dinsdag 20.4.54 = 17.50-18.00 u.*

**NIA BONDO FAMILIA**

En la fino de Februaro mortis 87-jara F-ino A. J. de Haas, kiu ek de la fondiĝo de la sekcio Hilversum fervoris por ĝia pligrandiĝo. Estante jam pli ol 60-jara ŝi ekstudis Esperanton kaj post akiro de la B-diplomo instruis la lingvon al multaj novaj adeptoj. Pluraj anoj ĉeestis la enterigon kaj metis florkronon en la nomo de la klubo sur la tombon.

**NIA BIBLIOTEKO**

Nia bibliotekisto, s-ro E. A. Koot, J. de Meesterstraat 12, Utrecht, grumbas! Ne mirige, ĉar kvankam la katalogo de nia biblioteko mencias multajn interesajn verkojn, ne nur studverkojn, sed ankaŭ literaturaĵojn kaj verkojn pri sciencaj temoj, ktp., la legemo de nia anaro en 1953 ege mal-kreskis. Entute li en la pasinta jaro pruntedonis nur 98 verkojn. Ni esperu, ke en la nuna jaro la legemo ree kreskos, ĉar atenta legado de bonstilaj verkoj estas bonega rimedo por pligrandigi sian lingvan scion. Resendante la pruntitajn verkojn vi nepre ne aldonu leteron aŭ alian skribajon al presaje forsendota pakajo, se ĝia pezo ne superas 750 gramojn, ĉar tiuokaze vi devigas la bibliotekiston pagi punafrankon.

Sed antaŭ ĉio: konsultu la katalogon, kiu mencias pli ol 650 verkojn kaj elektu libro(j)n laŭ via plaĉo. Sekcioj eventuale mendu kolektive por siaj anoj por redukti la afrankelspezojn.

**LA EKZAMENOJ EN 1953**

En la jaro 1953 partoprenis la A-ekzamenojn 81 kandidatoj, el kiuj 53 sukcesis. La nombro da sukcesintoj do estas malalta. Ofte montriĝis, ke la kandidatoj ne havas sufiĉe da sperto en la apliko de la gramatikaj reguloj kaj estontaj kandidatoj agos saĝe, tradukante kvanton da ekzamentaskoj antaŭ ol partopreni la ekzamenon. La elparolado de la supersignitaj literoj plurfoje ne estis korekta.

La B-ekzamenojn partoprenis 24 kandidatoj, el kiuj sukcesis 13. Al pluraj kandidatoj la komitato nur post longa diskutado povis doni la diplomon. Ofte la skribaj taskoj estis apenaŭ sufiĉaj kiam la plimulto por la busaj fakoj akiris bonajn poentojn, sed oni devas konsideri la fakton, ke pluraj sufiĉe spertaj esperantistoj profitis la lastan okazon akiri la B-diplomon.

Laŭ peto de multaj esperantistoj, kiuj ne intencas fari ekzamenon S (antaŭe B), sed tamen deziras pruvi ke ili progresis, la komitato enkondukis mezan ekzamenon M. La nova prospekto mencias la postulojn por tiu meza diplomo. La komitato esperas, ke la nova aranĝo, kiu prezentas al ĉiu la eblon akiri diplomon laŭ siaj kapabloj, instigos la esperantistojn al pli energia studado kaj ke la nombro da kandidatoj konsiderinde kreskos por la bono de la Esperantomovado en nia lando.

La aranĝo, laŭ kiu malsukcesintaj kandidatoj rajtas partopreni novan ekzamenon je favorotizo, validas ankoraŭ en la nuna jaro, sed tiuj, kiuj en 1954 malsukcesos kaj deziras denove partopreni ekzamenon en 1955, tiam devos pagi la plenan kotizon.

**Financa stato 1953.**

Saldo 1952	212,56	
Kotizo de la asocioj	60,—	
Jarkunveno		100,50
Kvar ekzamenoj	170,75	
Administrado		145,13
Presajoj		119,03
Saldo 1953		78,56
	443,31	443,31

Por la ekzamenoj E, M kaj S, kiuj okazos en Amsterdam la 27-an de majo 1954-a oni nepre anoncu sin antaŭ Pasko ĉe la sekretario, f-ino H. M. Mulder, Zilvermewuistr. 29, Badhoevedorp.

**LA POSTKONGRESOJ EN NEDERLANDO**

Tuj post la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem okazos postkongresoj en Leeuwarden kaj Rotterdam.

Ĉiuj, kiuj aliĝis al la 39-a U.K., jam ricevis kune kun la Dua Bulteno plaĉaspektan faldfolion pri la provinco Friesland kaj informojn pri la Leeuwardena postkongreso.

Ĉi sube sekvas informoj pri la postkongreso en Rotterdam:  
 7 VIII; 14-a h. Malfermo de la akceptejo kaj informejo; disdono de la dokumentoj.

8 VIII; 13-a h. Komuna lunĉo; aŭtobusekurso tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. 17.30 h. Komuna tagmanĝo.

9 VIII; Posttagmeze granda ekskurso, i.a. tra la famkonataj havenoj; komuna tagmanĝo survoje.

10 VIII; Matene vizito al brandfarejo en Schiedam aŭ alia interesa fabriko; lunĉo. 20-a h. Festvespero.

11 VIII; 10.30 h. Kafo kun kukajo; fermo kaj adiaŭo.

La kongreskotizo, kiu inkluzivas ĉiujn suprenomitajn aranĝojn, estas gld. 40,—.

Hotelprezoj (inkl. de matenmanĝo kaj trinkmono) 6—14,50 gld. por unu persono dum unu nokto.

La eksterlandanoj, kiuj vizitos Nederlandon, certe dezirus vidi la urbon, pri kiu ili legis kun premita koro antaŭ 14 jaroj. Ili povos vidi ne nur multajn postsignojn de la milito, sed ankaŭ grandiozajn riparojn, i.a. la Grandkomercan Domegon, novajn bankojn, kaj butikojn, eĉ tute novajn stratojn en la centro de la malnova urbo. Cetere la urbo havas multajn vidindaĵojn, la havenojn, la tunelon, muzeojn, malnovajn kaj novajn loĝkvartalojn,

**Flandra Ligo Esperantista.**

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenstraat 29, Kortrijk.  
 Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, Sint-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).  
 Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.  
 Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)  
 U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.  
 Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)  
 Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

**BCKE**

La 10.4.54 okazos kunveno de la Belga centra komitato Esperantista en Bruselo; la komitatoj inter alie pri-traktos la Beneluksan kongreson en Lieĝo kaj la problemon de la Esperanto-informado ĉe nia registaro okaze de la Unesko - konferenco.

**TERUG AAN AFZENDER - NEDERLANDS a.u.b.**

Met het doel onze taal te doen eerbiedigen heeft het K.V. Hoogstudentenverbond te Leuven, keurige en kleurige kleefzegeltjes uitgegeven, ontworpen door een Antwerps sierkunstenaar. Voor het gebruik ervan is zeker geen handleiding nodig!

De zegels kunnen besteld worden op het secretariaat van het KVHV, Minderbroederstraat 8, te Leuven, en kosten 10 F voor 11 bladen met elk 8 zegeltjes (P.C. 47.50.20).

**GENERALA JARKUNVENO**

(Pentekoston 1954 en Liĝo)

Proponoj de la estraro:

Aldono al art. 21 de la organiza regularo:

„Een bestuurslid dat driemaal achtereenvolgens zonder geldige reden „afwezig is op een bestuursvergadering, kan door het bestuur als onslagnemend beschouwd worden. Er wordt in zijn vervanging voorzien tot de volgende jaarvergadering.”

Koncerne artikolon 1 de la organiza regularo, la Ligestraro proponas ŝanĝi la ĝisnunan formaton de Flandra Esperantisto. Anstataŭ 44 x 28 cm. ni proponas la duonon, nome 28 x 22 cm. La kialo estas ke jam nun la revuoj de Reĝa Belga Ligo kaj Svisa Espero aperis en tiu pli plaĉa formato; ni konstatis ke la laboro de la ĉefredaktoro multege plifaciliĝus se ni adoptus tiun formaton. Cetere, multaj membroj jam plurfoje sugestis formato-ŝanĝon.

**LA LIEGA KONGRESO**

En la nuna numero de la gazeto, vi trovos la aliĝilon por la ĉi-jara Beneluksa. Nepre tuj plenigu ĝin, resendugin al nia kasistino kaj ĝiru la necesan sumon je ŝia p.ĉ.k. 2321.50 de V.E.B., Raapstr. 74, Gent.

ktp.

Do...kaptu la okazon!

Petu aliĝilon de s-ro J. M. J. Driessen, S. Mullerstraat 7a, Rotterdam-W. La aliĝilo donas detalajn indikojn pri la pagmaniero.

**LOTERIJ NOSOBE**

Uitslag:

1e Prijs: herenpolshorloge nr 17747.

2e Prijs: damespolshorloge nr 23466.

Penningm. H. Delver,

Versteeghstr. 65, Bussum.

**BIBLIOTHEEK L.E.E.N. NIEUWE AANWINSTEN**

**LECTUUR VOOR BEGINNERS**

1264 J. F. Berger

Niko kaj Nina

**ROMANS, NOVELLEN, ENZ.**

1265 H. Rider Haggard

Ŝi

G. J. Degenkamp

1266 K. Jost

Modesta Budeko

1267 M. Seynaeve

Paĝoj el la flandra literaturo

G. H. Backmad

1268 A. Strindberg

La konscienco riproĉas

1269 R. Muschler

La Nekonatino

J. M. Inman

1270 R. Ballantyne

La hundo Kruso

1271 J. H. Rosbach

Bagatelaro

1272 H. de Balzac

La firmao de la kato...

P. Benoit

1273 J. Thézard

Polusaj glacioj...

1274 A. Niemojevski

Legendoj

B. Kuhl

**GEDICHTEN, TONEEL, ENZ.**

1260 M. Dekker

La mondo ne havas atendejon

F. Faulhaber

1275 Moliere

Amfitriono

E. Legrand

1276 Shakespeare

Trojlo kaj Kresida

S. A. Andrew

**ECONOMIE, SOCIOLOGIE, ENZ.**

1280 Lanti

Manifesto de sennaciistoj

1281 Wiczorek

Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco

**LEERBOEKEN VOOR BEGINNERS**

1261 H. A. Appel

Esp. leerboekje I

1262 F. Randi

Leerboek Esperanto

1263 T. Waddy

Tra la jaro

la bibliotekisto E. A. Koot.

